

La originalaj romanoj de Esperanto

Miroslav Malovec

Ĉiuj lingvoj komencas sian literaturon per tradukoj, precipe de Biblio, sed fine ilia lingva prestiĝo dependas precipe de literaturo originala. En Esperanto ludas la tradukoj eble pli gravan rolon ol en lingvoj naciaj, tamen ankaŭ Esperanton la ekstera mondo juĝas laŭ originaloj. La publiko ofte opinias, ke Esperanto havas nur tradukojn, ke originaloj tute mankas, pro tio ĝi ne estas plenvolara lingvo, sed nur komunika helpilo sen propra kulturo. Tial tre gravas, ke esperantistoj mem konu la originalan literaturon de la internacia lingvo.

Kompreneble, same kiel en aliaj lingvoj, ankaŭ la esperantlingvaj aŭtoroj havas tre diferencajn kvalitojn, sed tre gravas ankaŭ la tempo, kiam ili verkis. Por pioniroj de nia literaturo oni ne uzas tiom severajn kriteriojn kiel por aŭtoroj nuntempaj, kiam la lingvo disvolviĝis.

Eble la unuan esperantlingvan romanon verkis ruso *Ivan Ŝirjaev* (la sama, kiu iniciatis Enciklopedion de Esperanto) sub la nomo **Sen titolo**, sed ĝi kuŝis unu jarcenton kiel manuskripto en la viena muzeo kaj nur en 1995 ĝi estis eldonita. La aŭtoro priskribas sian vivon en pastra seminario kaj kiajn problemojn faris al li liaj instruistoj pro Esperanto.

La unua eldonita esperantlingva romano (en 1907) estis **Kastelo de Prelongo** de franco *Henri Valienne* (1854-1908), romano iom horora kaj memoriganta pri Alexandre Dumas aŭ nia Josef Svátek. Germano vivanta en Anglio *Henrich August Luyken* (1864-1947) famiĝis precipe per historia romano **Pro Iŝtar** el la tempoj bibliaj, konkrete el la tempo de Ijob. Tria aŭtoro de tiaspecaj romanoj estas nederlandano *Hendrik Jan Bulhuis* (1865-1945). El liaj verkoj estas por ni plej interesa **Idoj de Orfeo** (1923), kiu rakontas travivaĵojn de kvar knaboj, kiuj ĉiuj vivis en alia lando, parolis alian lingvon, spertis mizeron kaj estis trovitaj de mecenatoj, ĉar ili ĉiuj havis eminentan muzikan talenton. Kiel junuloj kaj jam famaj muzikistoj ili foje renkontiĝis ĉe muzika festivalo kaj tre miris, ke ili estas similaj unu al la aliaj kiel ovoj. Montriĝis, ke ili estas ĝemeloj de ĉeĥa patrino, al kiu ili estis post akuŝo krime forrabitaj kaj dissenditaj al diversaj landoj.

Inter la du mondmilitoj aperis pluraj talentaj aŭtoroj. Hungaro *Julio Baghy* (1891-1967) en sia romano **Viktimoj** (1925) priskribas siajn travivaĵojn en Rusio kiel militkaptito, kiam li instruis al siaj kunuloj Esperanton. Li priskribas ankaŭ militajn teruraĵojn, ekzemple de ĉeĥaj legianoj, kiuj senvestigis taĉmenton de kaptitoj, enpelis ilin tute nudajn en riveron kaj poste konkuris, kiu pafmortigos plej multajn el ili. Polo *Jean Forge*, propranome Jan Fethke (1903-1980) famiĝis per romanoj **Saltego trans jarmiloj** (1924) pri tempomaŝino, kiu transportis la aŭtoron en la antikvan Romon, kaj precipe **Mr. Tot Aĉetas Mil Okulojn** (1931) pri hotelestro, kiu permesas al firmao instali en hotelo kameraojn por pli bona sekureco, sed poste li malkovris, ke la firmao misuzis tion por spioni la gastojn. Sveda aŭtoro *Stellan Engholm* (1899-1960) verkis serion de romanoj pri urbeto Torento (**Al Torento, Homoj sur la Tero, Infanoj en Torento**) kaj ĝia junularo. En la jaro 1933 aperis romano **Metropoliteno** de la rusa aŭtoro *Vladimir Varankin* (1902-1938). Metropoliteno estas malnova nomo por metroo, la subtera tramo, kiun oni planis konstrui en Moskvo. La romano priskribas la etoson en Sovetunio sub la prema stalinismo. Unu jaron poste aperigis *Hans Weinhengst* (1904-1945) romanon **Tur-strato 4** pri laborista kvartalo en Vieno kaj pri ekzisto-problemoj de la loĝantoj dum la ekonomia krizo.

Post la dua mondmilito venis renaskiĝo de la movado kaj aperis ankaŭ novaj originalaj romanoj. **Kredu min, sinjorino** (1950) de sviso Cezaro Rossetti (1901-1950) en bonhumora stilo rakontas travivaĵojn de vojaĝanta komercisto, kiu devis uzi diversajn trukojn por sukcese vendi siajn varojn. **Vivo kaj opinioj de majstro M'Saud** (1963) de franco *Jean Ribillard* (1904-1962) same bonhumore prezentas rakontadon de azeno. **Kiel akvo de l' rivero** (1962) estas granda romano de humoristo *Raymond Schwartz* (1894-1973) pri la homoj antaŭ la unua mondmilito, kiam ili sentas, ke la milito proksimiĝas. **Maskerado ĉirkaŭ la morto** de hungaro *Tivadar Soros*, propranome Teodor Schwartz (1894-1968), priskribas faŝistan persekutadon de judoj en Budapeŝto duonjaron antaŭ la fino de la dua mondmilito.

Al klasikajoj de internacilingva kulturo apartenas ankaŭ romanoj **Litomiŝla tombejo** de *Karolo Piĉ* (1920-1995) kaj **Hetajro dancas** de *Eli Urbanová* (1922-2012). Ambaŭ aŭtoroj bildigas ne nur siajn aŭtobiografiojn, sed ankaŭ la esperantistan movadon en nia lando, kiam ili aktive partoprenis ĝin. Karolo Piĉ, kiu komence estis kontraŭ neologismoj, dum verkado de la romano enkondukis multajn novajn vortojn, pro kio li estis de multaj kondamnata, dum liaj admirantoj lin konsideras la plej granda esperantlingva aŭtoro.

En la nuntempa esperantlingva literaturo gravas romanoj de aŭstraliano *Trevor Steele* (1940), sviso *Claude Piron* (1931-2008), hungaro *Istvan Nemere* (1944), sloveno *Vinko Oŝlak* (1940), kroatino *Spomenka Ŝtimec* (1949). Anglino *Marjorie Boulton* (1924) verkas rakontojn kaj poemojn. Al talentuloj apartenas ankaŭ hispano *Jorge Camacho* (1966) kaj portugalo *Goncalo Neves* (1964), svedo *Sten Johansson* (1950), franco *Georges Lagrange* (1928-2004), portugalo *Manel de Seabra* (1932), anglino *Anna Löwenstein* (1951), rusino *Lena Kapurnina* (1963-2013) hungaro *Blazioo Vaha* (1948) kaj franciĝinta hungaro *Eŭgeno de Zilah* (1939).

Mi povus ankoraŭ mencii aventurajn romanojn de *František Omelka* (1904-1960), precipe **Alaska Stafeto** kaj **La granda admiralo**, kaj *Stanislav Bubeniček* (1904-1979) kun romano **Sub cirkotendo**.

Eblus mencii ankoraŭ multajn aliajn nomojn. La leksikono de Esperanto-verkistoj el la jaro 2006 enhavas 890 nomojn.